NOVEMBRO 2013

La « Espéranto-Gironde » Informilo

N° 138



# Zamenhof-tago



## la 15-an de decembro
## en Cenon Palmer
## ekde la 10-a horo!

# ĜENERALA KUNVENO
# La 29an de SEPTEMBRO 2013
# ĉe MORINE STRIDE en CREON

Ĉeestis 18 membroj: Bernard kaj Rose, Thierry kaj Brigitte, Morine, Marcel kaj Claudine, Jean-Seb, Violette, Josette kaj Daniel, Yannick kaj Janine, Christiane kaj Michel, Joël, Monique, Bruno.

**Malfermo je la 10a horo 45.**

**Marcelo** gratulas **Bernardo**-n pro la laboro farita dum lia mandato, ĉefe pro lia grava rolo dum la kongreso de IFEF kaj Espéranto-France, okazinta en majo, kaj dankas ĉiujn, kiuj helpis al la sukceso de tiu kongreso.

**Bernardo** komentas sian moralan raporton aperintan en LEGI 136. Li ne intencas daŭrigi la prezidantecon, escepte se prezentas sin sekretari(in)o, kaj se oni proponas programon de aktivaĵoj.

Ni dankas **Marcelo**-n pro la disdono al la ĉeestantoj de la tre bela memoralbumo pri nia spektaklo «La sekreto de la magia trajneto». Ankaŭ pro speciala LEGI dediĉita al Sabine. Tiuj du libretoj estas ege belaj kaj estas tre kortuŝaj donacoj.

**FINANCA RAPORTO** (30/09/2012 ĝis 29/09/2013)

33 kotizintoj al Espéranto-Gironde (39 en 2012)
13 aliĝintoj al SAT-Amikaro (12 en 2012)

| | |
|---|---|
| Enspezoj | 3.232.34 € |
| Elspezoj | 2.827.19 € |
| Bilanco | 405.15 € |
| Ŝparkaso | 3.814.78 € |

Koncerne la elspezojn kaj enspezojn rilatajn al la preparado de la kongreso de majo, jen ĉi-sube:

| | |
|---|---|
| Elspezoj | 1.691.39 € |
| Enspezoj | 1.620.00 € |
| Provizora deficito | 71.39 € |

(ĉar ni atendas 200 €-an subtenon ankoraŭ ne ricevitan)

**<u>PROJEKTOJ:</u>**

- **Marcelo** zorgos pri filmo de la spektaklo «La Sekreto de la Magia Trajneto» prezentita dum la kongreso de majo.

- **Marcelo** sendos artikolon pri teatro al la revuo *Sennaciulo*.

- **José Camacho** el Madrido pretas aperigi la tekstojn de la «Trajneto» en Beletra Almanako, sed ne la partiturojn.

- **Morine** dezirus starigi kunvenon en Créon, malfermatan al ĉiuj, kun partopreno de siaj pacientoj, al kiuj ŝi jam parolis pri Esperanto. Pro tio ŝi petas helpon. **Joël** kaj aliaj sin proponas. (vd. p. 11)

- **Thierry** estas preta por helpi en muzika fako.

- **Marcelo** parolas pri eventuala K.D. (vd. p. 12)

- La Kompanoj estas invitataj proponi spektaklon por la UK 2015 en Lille.

- Peto de **Yves Nicolas** koncerne turneon en 2014 de **Miguel Angel Gonzales** el Kubo, inter la 1a de aprilo kaj la 30a de junio. Pro lernoferioj, la datoj inter la 13a de aprilo kaj la 11a de majo ne kongruos; ankaŭ ne la semajno antaŭ la Eŭropa baloto.

- **Claudine** esprimas ideon pri turismaj slipoj, pri nia regiono. Ŝi petas de ĉiuj zorgi pri kolekto de tradukoj, kiuj jam ekzistas, kaj labori pri novaj. Ŝi reprenas ideon de **Bernardo,** kiu en la jaro 1995 komencis tiun laboron, kaj rezignis pro manko da bonvoloj... Proponas sin: Bernardo, Marcelo, Claudine, Christiane, Michel, Yannick, Janine, Joël, Monique. (vd. p. 5 kaj 8/9)

- **Joël** parolas pri la eŭropa baloto kaj proponas partoprenon en debatoj pri lingvoj.

- **Joël** elvokas la venontan kongreson de UEA en Lille en 2015. Li proponas distribuotajn flugfoliojn.

- Dato de la **ZAMENHOF-TAGO**: dimanĉon la 15an de decembro. Venos pli malfrue informoj pri la loko. (vd. p. 1)

- Sabaton la 9an de novembro, **Sylviane Lafargue**, nome de IFEF, invitas ĉiujn el ni, kiuj partoprenis en la preparado de la kongreso, al komuna tagmanĝo en restoracio trovebla ĉirkaŭ la stacidomo Sankta Johano en Bordozo. **Janine** zorgos pri la restoracio. (vd. p. 8)

## ŜANĜOJ:



La nova estraro konsistas el:

**Prezidanto: Bernard SARLANDIE**
**Sekretariino: Janine DUMOULIN**
**Help-sekretariino: Morine STRIDE**
**Kasistino: Monique DUSSENTY**

Sed ne ŝanĝiĝas la prezo de la kotizoj al ESPERANTO-GIRONDE:
**17 € individua - 23 € para.**

**Yannick** konsentas zorgi pri la eldono de la venontaj LEGI, ĉar **Monique** deziras transdoni la taskon. Efektive ŝi zorgas pri ĝi de 11 jaroj, ekde oktobro 2002, post **Bernardo** dum 7 jaroj, kaj **Marcelo** dum 5 jaroj. Ŝi ofte sentis sin sola por trovi interesan materialon.

**Morine** sin proponas por ilustri la revuon. Yannick sendos ĝin rete, Bruno daŭre sendos ĝin poŝte.

Dankon al **Morine,** kiu tre agrable akceptis nin en bonaj kondiĉoj dum la tuta tago.

***Fino je la 13a kaj duono. Komuna tagmanĝo, kaj posttagmeze vizito ĉe la skulptisto Speranza.***

***Monique***



# Alvoko!!!

Dum nia ĝenerala asembleo la 29an de septembro, la partoprenantoj aprobis la ideon prepari regionan turisman gvidlibron en esperanto.

Unua laboro estas listigi kaj kolekti ĉiujn jam esperantigitajn klarigojn pri ekskursoj aŭ vidindaĵoj en nia regiono.

Skipo naskiĝis ĉirkaŭ tiu projekto. Temas pri : Bernard, Monique, Joël, Christiane kaj Michel, Janine kaj Yannick, Claudine kaj Marcelo.

Oni devas nun retrovi ĉiun dokumenton kaj scii:

- kiam oni preparis ĝin, en kiu okazo,
- kiu esperantigis ĝin,
- kiu havas ĝin,
- sub kiu formo (papere , komputile…)
- kiuj tajpos la paperajn dokumentojn.

Estis tiam decidite, ke ni pli precize reparolu pri la projekto post la manĝo en restoracio la 9an de novembro, kaj ni ankaŭ devis listigi aŭ kunporti la dokumentojn, kiujn ni havas.

**Tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la ĝeneralan kunvenon, sed interesiĝas pri tiu projekto kaj volas helpi, povas sin anonci al la jam nomita skiparo** (vidu la retadresojn p.9) **kaj diri, kion ili pretas fari.**

*Claudine*

**INTERESATOJ PRI TIU PROJEKTO**

**NE MALTRAFU LA VENONTAN LABORKUNVENON:**

**LUNDON, LA 2-AN DE DECEMBRO JE LA 14-a**

**EN CENON PLAMER**

**KUNPORTU VIAJN TEKSTOJN!!!**

# VIZITO AL SKULPTISTO

La vetero estis aŭ suna aŭ pluva. Pro tio la kunveno okazis interne de la domo de Morine, same kiel la manĝado kiu sekvis.

Kiel kutime la pladoj ne mankis, tiel ke la kvar boteloj da pomsuko, kiujn mi alportis revenis hejmen … plenaj. Eble ili havos pli da ŝanco dum la Zamenhof Tago!

Post la manĝo ni havis la plezuron vidi Michel Lavergne venintan saluti nin. Ne eblis al li, bedaŭrinde, longe restadi pro malsano de Paulette, lia edzino.

Post la kafo kaj lastaj informoj, je la 16a horo, ni grupiĝis en veturiloj por viziti Spéranza-n, skulptisto loĝanta je 5 km sude de Créon.



Ekslernanto de la Lernejo pri Belaj Artoj en Bordozo, li instaliĝis en vilaĝo Haux, meze de arbohava parko vasta je 4,5 hektaroj. Li prilaboras ŝtonon, lignon, metalon, brančojn, eĉ alian materialon kreitan de li. Ni povas konatiĝi kun strangaj skulptaĵoj dissemitaj en tiu parko, ĉu ŝtonaj, ĉu el diversaj lignoj, kies inspiroj devenas de la romanika arto, afrika arto, de la naturo aŭ de danĝeroj de nia nuna socio, kiel la nuklea industrio.

Nuntempe li laboras pri renovigo de retablo de la preĝejo en Cambes, ĝirondia vilaĝo.

Li estas pasia skulptisto, kiu abunde parolas pri sia arto.

***Monique***

Speranza… kiu baldaŭ eklernos esperanton ĉe Morine!





KELKAJ



VERKOJ





DE



S
P
E
R
A
N
Z
A

# RAPORTO PRI LA KUNVENO EN RESTORACIO LE MUNICH

La 9an de novembro, dank'al la organizintoj de la lasta IFEF kongreso, 20 personoj (8 fervojistoj kaj 12 ĝirondianoj inter kiuj 10 Kompanoj) retrovis sin en restoracio Le Munich.




Simpatia etoso ĉe longa tablo kaj bona abunda manĝo facile favoris pludaŭrigon de amikaj babiladoj.

Je la fino, kiel programite, ni provis reparoli pri la projekto de la turisma gvidlibro.

La sidlokoj netaŭge aranĝitaj malebligis longan interŝanĝon kaj bonan aŭdeblecon. Tamen ni iom antaŭeniris.

Jen la rezulto:

- Ĉiuj tekstoj estas tajpotaj en la sama formato A4, unue per Word, fine enpaĝigotaj per Publisher.

- Tiuj jam tajpitaj estas modifotaj kaj enpaĝigotaj samformate.

- Tiuj ankoraŭ ne tajpitaj estas tajpotaj.

• En Montendre, la grupo tajpos 2 dokumentojn: unua pri « vojo de Montendre (?) al Royan » (aŭ io tia), dua pri malkovro de Bourg-sur-Gironde per ludo, kiun ili esperantigos.

• Joël posedas en arkivo plurajn klarigojn pri Sankta Emiliono, kiujn li serĉos kaj kunportos venontfoje.

• Bernardo diligente konservis valorplenan dosieron entenantan spurojn de la unua provo fari turisman gvidlibron en Ĝirondio. Sed pro manko da fortoj(?), tempo (?), aŭ tro da aliaj projektoj (?) neniam ĝi finrealiĝis.

Mi ankaŭ ĉerpis el la dosiero paĝon entenantan skizon de laboro tra 32 demandoj. Oni tuj vidas, ke la tiama projekto estis tre interesa, kompleta, detala sed ege ambicia. Se ni decidas relanĉi la projekton sur la samaj bazoj, ni antaŭvidu multe kaj longe labori. Por eviti tro penigan laboron, kiu povus senkuraĝigi la skipon antaŭtempe, mi proponas, ke dum nia venonta kunveno, oni kune elektu la prioritatajn punktojn.

- Josée kaj Michel sendos sian laboron. Temas pri:
  * ekskurso al la bordoza tramriparejo,
  * ekskurso al la subĉiela muzeo de Marquèze,
  * libreto disdonita fine de la vizito al ĉiuj kongresantoj partoprenintaj en la vizito.

Pri la funkciado de la skipo, ĉiuj konscias, ke kunvenoj necesas, bonvenas, sed ne estas facile trovi ĉiam taŭgan komunan daton. Oni tamen povas interŝanĝi rete, ĉiam sendante ĉiujn mesaĝojn al ĉiuj el la skipo.

Jen sube la retadresoj de ĉiuj:

Monique Dussenty monique.duss@free.fr
Bernard Sarlandie bernard.sarlandie@gmail.com
Christiane kaj Michel Jagueneau michel.jagueneau@orange.fr
Josée kaj Michel Lafosse michel.josee.lafosse@orange.fr
Yannick kaj Janine Dumoulin yannickdum@neuf.fr
Joël Lajus lajus.joel@wanadoo.fr
Marcel kaj Claudine marcel.redoulez@wanadoo.fr

Krome, la plimulto de la skipo favoras kaj konsentas kunveni iun lundon en Palmer. Do mi proponas venontan kunvenon en Cenon Palmer je la 14:00, ĉu lundon la 2an de decembro (prefere), ĉu lundon la 9an de decembro.

*Tagordo:*

- *Alĝustigi la aferon*
- *Kontrolo de la dokumentoj:*
  * *tiuj, kiuj estas jam tajpitaj;*
  * *tiuj, kiuj estas tuj pretigotaj;*
  * *la aliaj, kiuj estas tajpotaj kaj kiujn vi trovos kaj alportos;*

*- Partigo kaj disdono inter ni de la tajpotaj dokumentoj;*

*- Alĝustigo laŭ niaj nunaj fortoj de la skizo donita de Bernardo;*

*- Prezento kaj elekto de Publisher modeloj, por ke poste ĉiuj dokumentoj aspektu sammaniere;*

*- Partigo kaj disdono inter ni de la taskoj por enpaĝigi la jam tajpitajn tekstojn laŭ la elektita Publisher modelo.*

Bonvenas viaj reagoj.
Dankon.

***Claudine***

## Ĉe Speranza plu...





# Gratulojn!

## FELIĈO ĈE FAMILIO SARLANDIE

Bernardo, la Prezidanto de Esperanto-Gironde, kaj Rose, kun granda feliĉo, anoncas al la grupo la edziĝon de sia filo **Guilhem** kun **Elena**, en Italio (Torino), pasintan 28an de oktobro. Ili ambaŭ parolas la francan kaj la italan; ankaŭ la anglan. Ĉu ili baldaŭ lernos esperanton? Ni vidos…

## NIAJ KURSOJ

**Bona novaĵo!** Nova kurso por komencantoj ĵus inaŭguriĝis en CREON, ĉe Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. La venonta sesio okazos merkredon la 11-an de decembro.

Informoj: 06 10 07 08 58

Kompreneble plu daŭras niaj aliaj kursoj:

- En GALGON, ĉiun lundon de la 17-a k. 30 ĝis la 19-a k. 30, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj.

Informoj: 05  57 69 26 96



- En CENON (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14-a kaj la 17-a, Marcelo REDOULEZ gvidas traduko-grupon.

Informoj: 05 56 21 38 64

## La KOMPANOJ... engaĝita trupo!

La KOMPANOJ rajtas fieri pro sia repertuaro. La spektakloj jam prezentitaj ĉiam montris fortan engaĝiĝon politike maldekstra.

Nia lasta « *La Sekreto de la magia trajneto* » certe estas la plej poezieca kaj amuza, ĉar ĝia unua celo estis distri la publikon. Tamen pluraj scenoj reliefigis niajn sociajn vidpunktojn ; ekzemple rigarde al kontraŭrasismo (*La malnova Balancilo*), negraj sklavoj (*Luizianaj Noktoj*), kampara senhomigo (*Ekzilo*) kaj sindikatismo (*Kejzi' Ĝoŭns', la strikrompanto* kaj *Portreto de gravuloj*).




Fine de la spektaklo, mi tre ĝojis okulumi al nia antaŭa spektaklo «*La Pariza Komuno, kantante!*» levante la pugnon kaj laŭte kantante la unuan strofon kaj la refrenon de *la Internacio*. Ĉefe apud almenaŭ ŝajne samopinianta ministro, kies ŝuojn mi surgenuita ĵus botlekeme purigadis... Ĉu sincere poezie, ĉu ironie ŝerce, ĉu konvinke emocie, ni kunkantis ribelajn eĉ revoluciajn kantojn. Tiaj plu estu la KOMPANOJ.

Tial mi proponas, ke La KOMPANOJ partoprenu en la projekto de SAT-Eldon-Fako, kiu preparas kompilon de engaĝitaj kantoj en esperanto. Ni aludis pri tio dum la Ĝenerala Asembleo de ESPERANTO-GIRONDE ĉe Morine la 29an de septembro. Mi petas al interesatoj signi al mi kaj ekkolekti proponotajn kantojn.

***Marcelo***

## La KOMPANOJ (Les Copains)... une troupe engagée !

Les KOMPANOJ ont le droit d'être fiers de leur répertoire. Les spectacles qu'ils ont déjà présentés ont toujours montré un fort engagement politique à gauche.




Notre dernier, "*Le Secret du petit train magique*", est sans aucun doute le plus poétique et amusant parce que son but premier était de distraire le public. Pourtant, plusieurs scènes mettaient en évidence nos points de vue sur la société. Par exemple au regard de la lutte contre le racisme (*La vieille Balançoire*), l'esclavage (*Nuits de Louisiane*), l'exode rural (*Exil*) et le syndicalisme (*Casey Jones* et *Portraits d'hommes importants*).

A la fin du spectacle, j'ai été très heureux du clin d'œil à notre précédent spectacle "*La Commune en chantant !*", levant le poing et chantant à haute voix le premier couplet et le refrain de l'Internationale. Surtout aux côtés d'un ministre d'opinion semblable, au moins en apparence, moi qui, juste avant, lui cirais les pompes... Soit sincèrement poétiquement, soit ironiquement pour plaisanter, soit émotionnellement par conviction, nous avons chanté ensemble des chants de luttes et même révolutionnaires. Que les KOMPANOJ restent tels quels !

Voilà pourquoi je propose qu'ils participent au projet du comité d'édition de SAT, qui prépare une compilation de chants engagés en espéranto. Nous avons fait allusion à cela lors de notre A.G. chez Morine le 29/09. J'appelle les intéressés à me faire signe et à commencer à rassembler les chansons à proposer.

## Jarfina FESTego kun Novjara FESTeno

en **kastelo Greziljono 49150 Baugé-en-Anjou**.

Distraĵoj, kursoj kaj aktivaĵoj por plenkreskuloj kaj infanoj.
Ĉiuj viaj kontribuoj bonvenas.

de la 28a de decembro 2013 ĝis la 2a de januaro 2014

Eblas veni partatempe, eblas ĉeesti nur la Silvestran FESTenon.

Por informoj: **gresillon.org/jarfino**

## Stage à BOURESSE

du 17 au 21 février 2014 :
Cours animé par Anne-Sophie Markov.
Niveaux : débutants, faux-débutants, avancés.
Il est prévu une session d'examens de l'Institut Français d'Espéranto après le stage le samedi 22 février.
Possibilité de venir passer l'examen sans participer au stage.

**KVINPETALO Esperanto-Centro**
**4 rue du Bureau 86410 BOURESSE**
Téléphone : 05 49 03 43 14 (ou 06 07 31 67 81)

Informations : **kvinpetalo.org/**

## Franca Esperanto-Instituto

Lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio.

Nia kunsido okazis la dimanĉon 6-an de oktobro en la sidejo de UFE.

Kiel anoncite, nia prezidanto de 2007, Klaŭdo Roux, ne renovigis sian kandidatiĝon por plia trijara mandatperiodo. Sin proponis por lin anstataŭi, Vinko Markovo, kiu unuanime estis elektita.

Nun ni havas eĉ du vicprezidantinojn: Janine Dumoulin kaj Mirejo Grosjean.

La sekretario plu estas Ĵak Le Puil, la kasisto, Michel Dechy, la direktorino de la ekzamenoj, Anne Jausions (kun la helpo de la ceteraj membroj de la ekzamena centro: Janine Dumoulin, Vinko Markovo, Christian Rivière kaj Renée Triolle) kaj la respondeculo de la TTT-ejo, Pierre Dieumegard.

Ekde nun la studendaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado estas:

- *La fotoalbumo* de Trevor Steele
- *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Manuel de Seabra
- *Kredu min Sinjorino* de Cezaro Rossetti
- *Ne ekzistas verdaj steloj* de Liven Dek

Sed antaŭ ĉio plej gravas instigi niajn kursgvidantojn puŝi siajn lernantojn al trapaso de ekzamenoj. Nur tiel la lernantoj kapablos taksi sian nivelon kaj havi emon al plia studado.

La tarifo por la unuagrada ekzameno estas nur 10 eŭroj. Kio ne devus esti obstaklo, ĉu ne?

Cetere, la FEI-ekzamenoj taksas diversajn kapablojn, pri kiuj la nun popularaj KER-ekzamenoj tute ne okupiĝas: movada kulturo, pedagogio, tradukado, interpretado, uzo de Esperanto en turismo, scienco kaj teknikoj. Do, ambaŭ ekzamen-sistemoj kompletigas sin reciproke.

Por pliaj informoj ne hezitu viziti nian TTT-ejon: <franca-esperanto-instituto.net>

Ĵak Le Puil
Sekretario

# ESTRARO
# de
# « ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux

* * * * * * * * *

Prezidanto:  **Bernard SARLANDIE**
24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tel: 06 83 29 40 13 / bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes  17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49 /  monique.duss@free.fr

* * * * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:
Yannick DUMOULIN —> yannickdum@free.fr